sub la suda kruco ★

ESPERANTO



La Jubilea Kongreso bezonas vian helpon

Humphrey Tonkin venos al Adelajdo

Integrated LOTE in the Primary Curriculum

Carl August Wittber patro de Esperanto

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 19 [1] • numero 105 • marto 2011



ESPERANTO
SUB LA SUDA KRUCO

Redaktoroj | Chris Krägeloh & Ŝandor Monostori
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au
P.O.Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).
Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – nzea@esperanto.org.nz

Kontribuu al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk@esperanto.org.au".
Limdato por kontribuoj por la sekva numero:
15 de majo 2011
La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opinioĵn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Copyright @ 2008, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Sur la kovrilo: Salakva krokodilo de Aŭstralio, la plej granda reptilio de la nuntempa tero.


5 Matematiko kaj muziko


8 JoMo koncertos en Adelajdo


10 Strategio planado


12 Herzberg, la Esperanto-Urbo


14 Artdekoracio


16 Vizito al eks-komunista Prago


18 Mondeto


24 Gifts out of the blue


28 Appeal to continue the house in Zimbabwe

mondo kun milit dek unu

Antaŭparolo

de Ŝandor Monostori

Dum la lastaj monatoj Aŭstralio kaj Nov-Zelando suferis terurajn naturajn katastrofojn. Kvinslando kaj Viktorio ricevis pluvegojn kaj estis inundataj. Krom tio Kvinslandon ankaŭ fortega tropika ciklono damaĝis. Laŭ la *Toowoomba Tereno* neniu kvinslanda esperantisto perdis sian domon aŭ vivon, sed la inundo ja tuŝis la vivojn de multaj. Inter aliaj la familio de nia prezidantino, Diano suferis grandan perdon.

La plej serioza kataklismo okazis en Nov-Zelando. La belegan urbon, Christchurch detruis monstra tertremo. Meze de marto mi vojaĝis al Rotorua dum longa viktoria semajnfino. Multaj nov-zelandanoj kun kiuj mi parolis en Wellington, Rotorua kaj Auckland dubis ĉu Christchurch estos rekonstruita.

Multaj el niaj internaciaj esperantistaj amikoj sendis siajn mesaĝojn de bedaŭro kaj maltrankviliĝo el ĉiuj anguloj de nia tero. Koran dankon pro iliaj simpatiaj vortoj.★

Detruitaj konstruaĵoj en Christchurch



Matematiko kaj muziko

Intervjuo kun Alan Bishop

de Katja Steele

Alan naskiĝis en 1937 en Britio. Lia patro estis instruisto de matematiko, poste direktoro de lernejo. De li Alan heredis matematikajn kapablojn. Kaj la patro kaj la patrino ŝatis muziki – li ludis violonon, ŝi vilonĉelon – kaj la muziko grave rolas ankaŭ en la vivo de Alan. Li lernis ludi pianon, trombonon kaj fagoton.

Alan studis en University College School en Londono loko, kie li trovis multe da matematiko, scienco, muziko kaj sporto. En la lastaj du jaroj de la duagrada lernejo li ludis fagoton en la Nacia Junulara Orĥestro. Kiam li devis decidi, ĉu li plustudu matematikon aŭ muzikon, venis la jena konsilo de muzikista amiko: "Se vi volas ĝui la muzikon, restu amatoro." Alan do elektis studi matematikon - kaj multe sportis.

Antaŭ universitato, en 1956 komenciĝis lia du-jara militservo ĉe la aerarmeo. Kiel radar-naviganto li jam tiam konatiĝis kun komputiloj.

Parto de lia vivo iĝis ĵazo kaj Jenny. Post ilia geedziĝo ili vojaĝis al Usono. Dum du jaroj li studis pere de gajnita stipendio kaj unu plian jaron li laboris kiel instruisto.

"En unu persono kunestas Alan, la profesoro pri matematika-edukado, kaj Alan la muzikisto"

El Usono Alan revenis kun klara celo: labori kiel esploristo. La starto estis en la Universitato de Hull, la sekva haltejo Cambridge, kie li restis dum 23 jaroj kaj doktoriĝis, gravaj 3 monatoj en Papuo Nov Gvineo (1977), 5 monatoj en la Universitato de Monash en Melburno (Aŭstralio) kaj poste Universitato en Georgia (USA). Jam internacie konata en la kampo de matematika edukado en 1992 Alan transloĝiĝis al Aŭstralio kaj akceptis konstantan postenon kiel profesoro ĉe la Universitato de Monash en Melburno, de kie li oficiale emeritiĝis en 2002. Kune kun Jenny li daŭre loĝas en Melburno, ĉiujare revizitadas siajn du filojn kaj la genepojn en Britio kaj vojaĝas tra la mondo por prelegi, gvidi, kunorganizi fakajn aranĝojn.

En unu persono kunestas Alan, la profesoro pri matematika-edukado, kaj Alan la muzikisto (ludanta multajn muzikilojn, kantanta – nun ekz. en "barbershop"-grupo), Alan – la vojaĝanto. Kun plena skalo de aktivaĵoj al ĉio-ĉi aldoniĝis unu plia grava elemento: Esperanto. Pri ĝi parolu li mem:

Dum 1969 – 1992 mi loĝis kun mia familio en Kembriĝo (Britio). Jenny estas triageneracia esperantistino kaj pro ŝi la Esperanto-grupo de Kembriĝo renkontiĝadis en nia hejmo, sed mi sukcese evitis ĝin.

Post nia translokiĝo al Aŭstralio Jenny decidis partopreni la Aŭstralian Somerkursaron de 1993 kaj invitis min kuniri. Pensante, ke mi partoprenos iom de la aranĝoj kaj poste ludos golfon, mi jesis. La klarigo, ke somerkursaroj estas fakte Esperantujo, kie Esperanto estas afero de 24 horoj tage, venis nur poste. Mi trovis min en la klaso de Vera Payne, afabla, efika instruistino, kiu kuraĝigis min verki artikoletojn por la somerkursara bulteno kaj nur post tri tagoj da E-lernado mi ja verkis unu, titolita: Esperanto kaj matematiko; ĉu ambaŭ estas internaciaj lingvoj? Kiel matematikisto mi vere ĝuis la logikon de la lingvo, speciale la sistemon de korelativoj; ĝi estas laŭ mi brila.

De tiam mi jam partoprenis plurajn somerkursarojn. Alia ero, kiu allogis min al ili, estis la E-muziko. La esperantistoj ofte kantas kaj mi ŝatis kunkanti kun Gay kaj Kay, kant-konkursi, akompani la kantadon per mia gitaro aŭ per pianludado, ekzerci ĥoruson, komponi muzikon al la Mazi-filmo...

1997, Universala Kongreso en Adelajdo. Jenny bone konis jam la sistemon de la UK-j, mi ne. Kiam ŝi proponis al mi akcepti la respondecon pri la artaj aranĝoj, mi sufiĉe facilanime jesis. La avantaĝo de mia sensperteco estis, ke mi ne povis kopii la ĝistiaman kongresan rutinon kaj mem elpensis novajn ideojn kaj solvojn de problemoj. Kompreneble, mi ricevis kelkajn organizajn ŝokojn, sed la fina impreso de mia unua kongreso restis pozitiva. Mi aparte memoras la kongresan kafejon Verda Kanguruo sur kies eta podio povis iam ajn dum la tago prezenti sin muzikistoj aŭ prelegantoj, aŭ la novspecan Internacian Artan Vesperon, kies eroj estis kunligitaj anstataŭ seka anonco per eta teatraĵo: du esperantistoj konatiĝas en la flughaveno kaj renkontas ĵongliston ktp. Post la kongreso mi dormis tutan semajnon!

Plia grava paŝo en mia E-vivo estis la projekto EKPAROLI en 1994. Ĝia subtitolo estas Esperanto Kiel Propedeŭtiko Al Rapidiĝo de Orientlingva Lernado kaj Instruado. Tiu ĉi projekto havis klaran ideon, fokuson kaj tion mi ŝatis. Tial, eĉ se la registaro ne subtenis ĝin, kiel "esplor-dekano" de mia fakultato pri Edukado ĉe la Universitato de Monash mi atingis, ke la universitato subtenu ĝin. Tiel eblis pagi salajrojn al tri kunlaborantinoj, inter ili Jenny. Estis bona eksperimento.

Grava loko: Fortaleza (Brazilo). UK en 2002, mia unua UK ekster Aŭstralio. Mi iris al la unua renkontiĝo de la internacia ĥoruso, sed simple ne aperis dirigento! Rapida decido: mi gvidos la kantadon. Tiel mi iĝis dirigento de la kongresa ĥoruso kaj malgraŭ la malfacilaĵoj mi vere ĝuis la laboron. De tiam mi estris kelkajn UK-ĥorusojn, kaj en Florenco (Italio, 2006) mi organizis la tutan Internacian Artan Vesperon kun Mireille Grosjean.

Muzika Esperanto-Ligo (MEL) estas unu el la fakaj asocioj de UEA. Kiam mortis ĝia multjara gvidanto Dimitar Terziev, mortis ankaŭ la Ligo. Mi decidis revivigi ĝin. Ĉar la muzikemaj esperantistoj vivas dise en la tuta mondo, por povi kontakti, ligi ilin, necesas bona retpaĝo. Sed kio estas Esperanto-muziko? Kion mi povas doni al la sistemo? La muzikemuloj povas renkonti unu la alian nur dum la UK-j kaj la partopreno en ili dependas de mono, politika situacio ... Ĉu eblas fari ion alian ol nur kunkanti? Eblo estas

dissendi informojn pri novaj kantgrupoj, pri la aperintaj kompaktdiskoj... sed mi ne vidas por mi klaran rolon. Estus utile havi iun, kiu helpus pri la retpaĝo...

3zzz estas radiostacio en Melburno, kiu ĉiusemajne donas al Esperanto 60 minutojn de sia programo. Ĝia iniciatinto kaj multjara gvidanto estis Svetislav Kanaĉki. Kiam li de tempo al tempo ne povis fari la laboron pro malsano, laŭ la instigo de Jenny mi iris al la studio kaj laŭtlegis artikolojn, iam ludis gitaron kaj kantis. Post mia emeritiĝo mi ekhavis pli da libera tempo kaj decidis partopreni trejnadon de 3zzz pri la funkciigado de paneloj kaj produktado de programoj, mi eĉ faris ekzamenon. Nun (estas komenco de junio), pro malsanproblemoj kaj feriado de miaj radiaj kolegoj, mi mem zorgas pri la kompleta preparo de kelkaj elsendoj. Interesa defio.

Alan, via vivo estis kaj daŭre restas multkolora, riĉa. Kiu homa valoro estas por vi en ĝi plej grava?

En mia tuta vivo gravis al mi havi respekton por aliaj kaj kiel parto de tio, ne juĝi la aliajn. La gepatroj, la instruistoj, mia eklezio (Church of England), miaj skoltklubanoj, ĉiuj instruis al mi servi la komunumon. Mi estis bonŝanca: mi perlaboris sufiĉe da mono, havis interesan laboron, trovis multajn amikojn kaj mia devo estas helpi la aliajn, kiuj ricevis de la vivo malpli. Mi klopodis trovi ekvilibron inter ricevi kaj doni, kaj mi esperas, ke mia kontribuo ne estis malgranda. ★



JoMo koncertos en Adelajdo

de Katja Steele



Ĉu vi scias, kion signifas la stranga nomo JoMo? Ĝi estas la artista nomo de Jean-Marc LeClercq, ĉarma franco – esperantisto, konata en Esperantio kiel kantisto.

El lia retpaĝo (www.jmleclercq.eu) vi ekscios inter alie pri lia esperantistiĝo en 1988, pri la grupo "La Rozmariaj Beboj", kiu koncertis eĉ sur la fama scenejo de la pariza teatro "Olympia" kaj pri registraĵo de koncerto el 22 kanzonoj en 22 lingvoj, kiu eniris la Guiness-libron de rekordoj de 2000. JoMo multe koncertis kaj daŭre koncertas esperante kaj alilingve, ĝojigante kaj dancigante la publikon de diversaj landoj.

Al la demando, kiuj estas liaj kantolingvoj, venis de li jena respondo:

"Estos du listoj: la lingvoj en kiuj mi kutime kantas, kaj la lingvoj en kiuj mi povas kanti post iom da relerno.

Mi kutime kantas en la : franca, okcitana, eŭska, hispana, kataluna, portugala, itala, rumana, angla, germana, nederlanda, ukraina, rusa, pola, silezia, serba, slovaka, jida, araba, hebrea, cigana, kreola (Haito), kosa (Sudafriko), lingala (Kongo), berbera (Nordafriko), ĉina, japana.

Mi povas kanti kun iom da preparo en la : bretona, bulgara, sveda, ĉuvaŝa, turka, greka, kartvela, hungara, tibeta, mohouka (Nordameriko), maoria (Nov-Zelando)."

Estus vere bedaŭrinde maltrafi liajn adelajdajn koncertojn! ★

Humphrey Tonkin

Inviton al la Jubilea Kongreso de AEA en Adelajdo akceptis unu el la plej influhavaj agantoj de la E-komunumo dum la lastaj jardekoj

de Katja Steele

Denaske el Anglio li studis anglan filologion en la Universitato de Kembriĝo (Anglio), poste en la Universitato de Harvard (Usono). Post la doktoriĝo Tonkin estis profesoro pri la angla literaturo ĉe la Universitato de Pensilvanio (Usono) kaj rolis inter alie kiel kunordiganto de internaciaj programoj. De 1989 li estis prezidanto de la Universitato de Hartford. Post sia retiriĝo el la prezida ofico en 1998 li plu instruadas en Hartford kiel "University Professor of the Humanities", la plej alta profesora rango atingebla en Usono.



H.Tonkin lernis Esperanton 15-jara. En 1961 li iĝis estrarano de TEJO, kaj inter 1969-71 ĝia prezidanto. Ankoraŭ ne 35-jara li fariĝis prezidanto de UEA kaj laboris en tiu funkcio dum 1973-80, 1986-89. De 2001 ĝis 2003 li estis vicprezidanto de UEA.

Sciante eble nur malmulton pri liaj sciencaj kvalifikoj aŭ movadaj meritoj multaj el ni renkontis kaj ekŝatis lin dum la UK-j pro liaj kongresaj paroladoj, pro la lerta reĝisorado de diskutoj pri la kongresa temo, pro lia laboro kiel prezidanto de la komisiono pri Belartaj Konkursoj, pro la spektakla gvidado de aŭkcioj...

Listigi liajn librojn kaj artikolojn – anglalingvajn aŭ esperantajn - okupus paĝojn. Por ilustri la vastan gamon de verkoj jen kelkaj ekzemploj: Lingvo kaj Popolo, esperantigo de La vivo de Henriko Kvina de Shakespeare, redaktado de la esperanta versio de Winnie-la-Pu.

La agado de H.Tonkin estas tre kompleksa. Pri literaturo, internaciaj studoj, lingvopolitiko li prelegis multfoje en multaj landoj kaj lia kontribuo al nia jubilea kongreso en Adelajdo certe levos ĝian prestiĝon. Laŭ niaj planoj H. Tonkin havos renkontiĝojn ne nur kun ni-esperantistoj, sed ankaŭ kun neesperantista publiko, ekzemple funkciuloj de universitatoj en Sidnejo kaj Melburno. ★

Strategia planado

Melburna renkontiĝo en februaro

de Ŝandor Monostori

La 26-an kaj 27-an de februaro okazis kunveno en Melburno pri strategia planado. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 20 aktivuloj de AEA.

Sabate la ĉeftemo estis la plano de Penny Vos *kiel enkonduki Esperanton en la elementaj lernejoj*. Antaŭtagmeze panelo de spertuloj donis siajn opiniojn pri la projekto. La panelo enhavis Alan Bishop, Rainer Kurz, Peter Ellyard, James Davis kaj Jonathan Moylan. La diskuton gvidis Carol Brands. Carol venis de Perto, kie ŝi iam laboris en la sama lernejo, kie Penny estis instruanta Esperanton. Laŭ Carol la projekto de Penny estis la sola sukcesa lingvoinstruado kaj Esperanto estis la sola fremda lingvo kiun la lernejanoj sukcesis ellerni dum la ĉirkaŭ 30 jara periodo kiam Carol laboris en lernejoj.

James estas la ĉefoficisto de la *Organizaĵo de Instruistoj de Aziaj Lingvoj*. Li proponis enkonduki Esperanton en malgranda grupo de lernejoj, kie ĝi funkcius kiel propedeŭtika lingvo antaŭ la eklernado de aziaj lingvoj. Esperento ankaŭ povus

Penny, Jenny, Alan, Carol kaj Jonathan dum la kunveno



funkcii kiel komunikilo inter tiuj elektotaj aŭstraliaj lernejoj kaj siaj partneraj lernejoj en Azio.

Alan estis profesoro de matematiko en la *Universitato de Monash*. Li proponis, ke ekzemple kandidatoj de PhD povus analizi la rezulton de lingva kapablo de aziaj lingvoj de lernejanoj, kiuj lernis Esperanton antaŭ eklerni siajn aziajn fremdajn lingvojn.

Rainer estas spertulo pri privataj entreprenoj. Li estas germano, sed kutime vivas en Aŭstralio dum la eŭropa vintro. Li emfazis la gravecon de malgrandigado de la financa risko de la projekto per prudenta planado.

Peter laboras por la Instituto de *Preferata Futuro*. Li antaŭdiris, ke la homara migrado daŭre kreskos dum la 21a jarcento kaj multaj socioj iĝos multkulturaj. Esperanto estas necesa ekzemple por solvi la problemon de la Eŭropa Unio, kie pli ol 20 lingvoj estas parolataj kaj laŭ la opinio de kelkaj ŝtatestroj multkulturismo tute fiaskis. Laŭ Peter indus enkonduki Esperanton eĉ dum la antaŭlerneja periodo.

Jonathan parolis pri la ebleco uzi Esperanton en la universitatoj. La regulado de universitatoj ŝanĝiĝos sekvontjare sekvontjare kaj la studentoj pli libere povos elekti inter la kursoj de diversaj universitatoj.

Dimanĉe la ĉeftemo estis AEA. Stephen Pitney informis la partoprenantojn pri la financa situacio de AEA kaj la mono havebla en la diversaj fondusoj. Carol kondukis grupetan diskuton pri la motivo de individuoj eklerni kaj uzi Esperanton. ★

Grupo de partoprenantoj



Herzberg, la Esperanto-Urbo

Esperanto estas instruata en gimnazio kaj baza lernejo kiel fakultativa lernobjekto en Herzberg

de Trevor Steele

Tuj ĉe la stacidomo oni vidas la unuan agrablan surprizon: monumenton german- kaj internacilingvan pri Joachim Gießner, fervojisto, unu el la motoroj de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) kaj valora civitano de Herzberg. Kaj Peter Zilvar, kiu renkontis min ĉe la stacidomo, tuj transdonis utilan kolekton da presaĵoj, inter ili E-lingvan mapon de la urbocentro. Antaŭ la Esperanto-Centro flirtis la flagojn de EU, de Esperanto, kaj – honore al mia vizito – Aŭstralio.



Mi loĝis senpage en iama loĝdomo de la fajrobrigado: la urba magistrato transdonis ĝin senpage – kaj senmeblan – al la esperantistoj, kiuj post multe da laboro kaj elspezoj povas loĝigi plurajn vizitantojn.

En preskaŭ ĉiu loko oni vidas indikojn pri Esperanto en la urbo: ne nur estas Zamenhof-statuo, sed multloke sagoj montras la vojon al la Esperanto-Centro. Eĉ pli impone, la oficialaj ŝildaj priskriboj de domoj, ktp, havas malsupre resumon en nia lingvo. Butiko, en kiu oni vendas ĝinsengteon, havas indikilon ankaŭ en Esperanto: ĝi apartenas al german-korea esperantlingva paro, kiu transloĝiĝis al la urbo ĝuste pro la E-elementoj.

Esperanto estas instruata en gimnazio kaj baza lernejo kiel fakultativa lernobjekto. La volontula bibliotekistino iom parolas nian lingvon, kaj inter la libroj estas malgranda sortimento en Esperanto. Eble plej impone, la burokrato respondeca por ĉiuj naturparkoj en la apuda mondfama Harz-Montaro, deziras, ke ĉiuj afiŝoj en la parkoj estu ankaŭ en la internacia lingvo. Sed provizore tiu tasko superis la laborfortojn en Herzberg: ĉu ne bona projekto por la Germana Esperanto-Asocio?

"En preskaŭ ĉiu loko oni vidas indikojn pri Esperanto en la urbo"

Kompreneble tiuj atingoj ne simple falis el la ĉielo. Peter obstine laboris multajn jarojn por plievoluigi la atingojn de Joachim Gießen, kaj nun Zsófia Kóródy, kapabla virino el Hungario, tre kompetente helpas Peter. La du partoprenas en multaj kunsidoj de aliaj grupoj, ekz. ekologiaj, magistrataj, kaj tio evidente gajnas simpation por nia lingvo. La nuna urbestro (de la Kristan-Demokratia Partio) forte apogas la agadon de la esperantistoj; se li perdos sian postenon, la opozicia kandidato simile aprobas nian lingvon!

Ni povas individue helpi la laboron de ICH (Interkultura Centro Herzberg). Eblas skribi al esperanto-zentrum@web.de kaj demandi, kiel helpi.

Se ĉiuj urboj havus similan sintenon al Esperanto ... nu, vi mem kompletigu la penson!★

Artdekoracio

Ekspozicio en Melburno

de Kam Lee

Carol kaj Miranda Lutz, Barry Cledsmith kaj mi vizitis la Nacian Artgalerion de Viktorio por viziti la artdekoracian ekspozicion.

Artdekoracio estas stilo de arkitekturo, interna konstruaĵa desegno aŭ modo kiu esprimas netradician elegantecon kaj enkorpigas la luksan vivmanieron kaj plezurismon de la ĵazepoko.

Ĉefa trajto de ĉi tiu stilo estas la uzo de simplaj kaj klaraj formoj. La uzo de bestoj, foliaro kaj sunradioj estas ofte uzataj motivoj en la pentraĵoj. Ĉi tiu epoko okazis inter 1910 kaj 1939 kaj la nomo originis el "Exposition Internationale des Arts Décoratifs et Industriels Modernes", kiu estis ekspozicio unue montrita en Paris dum 1925.

Bonvenon al la mondo de artdekoracio kaj riĉabundeco! Maldekstre al dekstre estas Barry, Miranda kaj Carol. Je la fono estas provizora fasado, kiu troviĝas ĉe la antaŭo de la artgalerio kaj reklamas pri la artdekoracia ekspozicio. Fotita de Kam Lee.



Influoj al artdekoracio estas art nouveau, kubismo, antikva egipta kulturo, nord-amerika kulturo kaj aliaj. Art nouveau estas stilo de arto, kiu okazis antaŭ la artdekoracia.

Dum la dua mondmilito, artdekoracio eksmodiĝis, sed iomete revenis dum la sesa jardeko.

La ekspozicio okazis ĉe la Nacia Artgalerio de Viktorio, kaj dividiĝis en a) ĝenerala kaj internacia b) aŭstralia parto.

La ĝenerala parto montris ekzemplojn de pentraĵoj, mebloj, juveloj, vestaĵoj, vitraĵoj, afiŝoj kaj aliaj. Aro de antikvaj egiptaj aĵoj estis ankaŭ montritaj.

La aŭstralia parto temis pri aspektoj de artdekoracio en Aŭstralio kaj montris fotaĵojn, pentraĵojn kaj aliajn.

La bonkonata pentraĵo, "Aŭstralia Marborda Desegno" (1940) pentrita de Charles Mere (1890-1961) estis montrita kaj portretas poetan kaj idealisman vidpunkton de distriĝaj agadoj je la Aŭstralia marbordo.

En alia ĉambro estis komputilo, kiu montris bildojn kaj lokojn de artdekoracie dezegnitaj konstruaĵoj en Melburno. ★

Esperantistoj kaj kopio de Artdekoracia Pentraĵo. En la fono estas kopio de la la pentraĵo "Mi metas ĵartelzonon ĉirkaŭ la Tero", kiu estas triptiko (oleo sur tolo) pentrita de Napier Waller (1893-1972). Oni ne permesas foti la originalan pentraĵon en la ekspozicio, sed almenaŭ ni povis foti kopion, kiu estas montrita je la flanko de la artgalerio.




Vizito al eks-komunista Prago

de David Ryan

En decembro kaj januaro mi vizitis dek landojn en Eŭropo kun mia familio. En orienta Eŭropo ni vizitis Pragon, Bratislavon, kaj Budapeston. Vizito al orienta Eŭropo estis tre signifoplena por mi ĉar mi interesiĝas pri moderna historio kaj mi ĉiam volegis viziti eks-komunistajn landojn.

Prago estas bela urbo kaj havas multegajn turistojn. Ni estis tie dum la novjara feria periodo kaj la urbo estis plena de turistoj, precipe el Italio kaj Rusio. Estis granda surprizo por mi vidi tiom da vizitantoj el Rusio ĉar almenaŭ en Nov-Zelando ni ne kutime vidas tiom da rusaj turistoj. Tie en Prago en restoracioj, turismaj oficejoj, kaj monŝanĝejoj ktp. ofte aperis afiŝoj en la rusa lingvo.

Mi imagis kia estis Prago antaŭ iomete pli ol 20 jaroj kiam Ĉeĥoslovakio (nun la Ĉeĥa Respubliko) estis komunista lando. Mi imagis James Bond kaj aliajn spionojn kiuj postkuras unu la alian en la stratoj kaj placoj. Eĉ antaŭ ne tiom longe, en 1968, rusaj soldatoj invadis



David Ryan | Maskoj por ĉiuj familianoj



David Ryan | Subtera bunkro

Ĉeĥoslovakion kaj batalis en la stratoj de Prago por forkurigi kontaŭulojn de la komunista registaro.

Dum mia vizito al Prago mi partoprenis mallongan ekskurson kiu temis pri la komunista historio de la urbo. Nia ĉiĉerono montris al ni restoracion de McDonalds kaj, flanke, etan muzeon pri komunismo. Nun regas kapitalismo en Prago kaj komunismo estas nur parto de la historio. Interese, nia ĉiĉerono komentis ke ne ĉio estis malbona dum la komunista epoko. Dum nia promenado laŭ la stratoj ni vidis ebriulon kiu ĝenis preterpasantojn. Nia ĉiĉerono diris ke, dum la komunista epoko, ebriuloj neniam kaŭzis problemon ĉar policistoj simple malaperigis ilin.

La plej interesa loko kiun mi vizitis en Prago estis unu el la bunkroj kiujn oni konstruis dum la komunista epoko por protekti la loĝantaron okaze de nuklea milito. Nun du junaj entreprenistoj posedas ĝin por montri al turistoj. Filmkompanioj ankaŭ uzas ĝin. La bunkro konsistas el multaj tuneloj kaj, kiam estis preta por uzo, ĝi havis sufiĉajn manĝaĵojn por (se mi bone memoras) ĝis tri mil personoj por unu semajno. Oni informis nin ke la pordoj de la necesejoj ne havis ŝlosilojn por eviti ke homoj sin ŝlosu tie por mortigi sin. Imagu se oni devis rapide eniri bunkron lasante familianojn ekstere kaj dum unu semajno oni suferegas pro siaj familianoj kiuj spertas la teruraĵojn de nuklea milito. Certe oni ne povis eliri ĝis la fino de la semajno (la pordoj al la bunkro estis neimageble dikaj). Kompreneble, kelkaj homoj verŝajne ne estus tolerintaj tiun suferadon.

La bunkro kiun mi vizitis havis ekspozicion pri gasmaskoj. Tiutempe oni disdonis maskojn al ĉiuj, eĉ al infanoj. Vidi tiujn maskojn estis terure por mi. Mi imagis milojn da gepatroj kun timplenaj etaj infanoj kiuj provas eniri bunkron antaŭ la alveno de subitmortiga nuklea misilo.

Tamen, ne timu. Feliĉe, la mondo estas nun pli paca loko. Mi certe rekomendas ke vi vizitu Pragon pro ties interesa historio, bela arkitekturo, kaj afablaj enloĝantoj. ★

Mondeto

Integrated LOTE in the Primary Curriculum

de Penelope Vos

In 1996, I was the deputy principal of The Foothills School, an alternative secondary school in Perth, W.A. The school had been teaching Japanese for many years and no-one had ever actually learned Japanese as a result. We held a review to discuss whether that mattered, starting with a brainstorm of our reasons for offering LOTE at all.

Our list looked something like this:

To engage curiosity and provide a global perspective.
To build confidence and self-esteem.
To provide the cognitive advantages of bilingualism.
To encourage empathy and respect for ESL immigrants.
To give our students flexibility to learn other languages as needed later.

We also took stock of our resources, especially time. Our students had about 200 minutes a week for 3 years to spend on LOTE, i.e. less than 400 hours in total. We recognized that most of our goals would not be reached unless students did substantially master the target language.

We discovered that motivated adults need over 3000 hours to gain basic competence in Japanese, that French or German are available in 700 hours and Esperanto could be learned in just 100 hours. (Our students were far from being "motivated adults"!)

Checking back through our goals, we asked (and answered!):

Which language would offer the best connection to the global community?

Esperanto provides a few million contacts in over a hundred maximally diverse cultures. No other LOTE offers that breadth.

Which language would best build confidence and self-esteem, even for students with language deficits?

Only Esperanto is designed to be easily learned. It is completely phonetic and uses regular word-building and uncomplicated grammar. No other language can offer as much success, to as many students.

Which language best provides the cognitive advantages of bilingualism?

In the time available, the students cannot be functionally bilingual in any other language than Esperanto.

Which language would let our students know how it feels to be limited in

expression by being deprived of one's mother tongue?

Learning another natural language would better demonstrate the difficulty of ESL but, to have the experience of speaking a second language imperfectly, students have to get further into a language than they usually do now, so Esperanto might be the best option here, too.

Which language provides most transferable experience for future flexibility?

Esperanto uses many Latin and Germanic roots so that there is a lot of transferable linguistic knowledge between English, Esperanto and other European languages. However, in its agglutinative nature and relatively free syntax, it also prepares students well for successful learning of Asian languages.

The Apprenticeship Language Effect

Studies, in Australia and abroad, have shown that a year of learning Esperanto benefits the learning of Japanese or French even more than an extra year of studying the new target language. The usual explanation is that a year of Esperanto learning is about linguistic structures, not exceptions, so that a holistic image of the essential features of a language becomes visible, instead of being lost in the detail of random idiosyncrasies like silent letters and doubling rules.

Having concluded that Esperanto would best set students up for success, in relation to our goals, we decided that lack of a specialist teacher was not enough reason to justify a compromise. If it was worth the students time to learn, it was worth a teacher's time, so I got the job. Before I started teaching, I had 6-7 lessons in Esperanto, I collected resources (mostly old and unacceptable for modern use) and started studying LOTE methodology.

In spite of my limited preparation, the course was a great success. By the end of term 1 year 8 were staying in at lunchtime and staying hours late after school to talk to Swiss kids (who had come to school early to talk to us) in Esperanto. They didn't have a big vocabulary at the time, but they were very keen to use what they had.

After 3 years of the program, I transferred to a Montessori primary school which was thoroughly fed up with LOTE. They felt that they had tried everything and found nothing satisfactory. I started teaching Esperanto to my class, then the next one too, and by the end of the year all of the primary school was learning Esperanto as LOTE. As with the high school students, they made good progress and soon reached the stage of being able to communicate, even though the time allowance was barely enough, at 40-60 minutes a week. In the 4th year of the program, 20 of the students travelled to Switzerland to visit the school I had made friends with years before. The children in the two schools had no common language but Esperanto, and it served the purpose.

